# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo februaro 2017**


## EKSPOZICIO KAJ PREZENTADO EN LA BIBLIOTEKO DE VALLECAS



Okaze de la komenco de la Jaro Zamenhof, kiu kunmemoras la centan datrevenon de la morto de D-ro Zamenhof, inaŭguriĝis ekspozicio, kunlabore kun la Pola Instituto pri Kulturo, en la Publika Biblioteko de la kvartalo Vallecas, kie situas la t.n. Centro de Pola Kultur-intereso de Madrido (loko por elmontrado de la kulturo de la komunumoj de enmigrintoj en la regiono).

La biblioteko situas en la Avenuo Rafael Alberti, 36 (proksime al metrostacio Miguel Hernández). La ekspozicio estos vizitebla de la 20a de januaro ĝis la 10a de februaro, en la normala horaro de la biblioteko. La 9an de februaro estos celebrata prezentado de la Jaro Zamenhof, kune kun gvidata vizito al la ekspozicio.




## PRELEGO PRI ZAMENHOF EN LA PALACO CAÑETE

La ĵaŭdon 2-an de februaro, je la 7a vespere, la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, prelegos pri D-ro Zamenhof kaj la aktualeco de lia verkado kaj ideoj, en la sidejo de la organizaĵo por rilatoj kun la juda kulturo, Casa Sefarad-Israel, en la Palaco de Cañete (strato Mayor, 69).

Ni invitas niajn amikojn kaj simpatiantojn akompani nin en tiu ĉi komenco de aktivadoj de la Jaro Zamenhof.

## ĜENERALA KUNVENO DE MADRIDA ESPERANTO-LICEO

Estimataj membroj de Madrida Esperanto-Liceo,

Jen la prezidanto alvokas ĉiujn membrojn por la ordinara ĝenerala kunsido okazonta la lundon 6an de februaro 2017, je la 18:00 (unua alvoko) kaj je la 18:30 (dua alvoko) en la sidejo de la asocio, strato Rodríguez San Pedro, 13, 3-7 de Madrido, por pritrakti la sekvajn aferojn:

1.- Raporto pri evoluo de la membraro

2.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la financa raporto 2016

3.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la buĝeto por 2017

4.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la Agad-raporto 2016

5.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la Agad-programo por 2017

6.- Ĉu kandidatiĝi por organizi en Madrido en 2018 la Internacian Junularan Kongreson aŭ la kongreson de ILEI.

7.- Demandoj, petoj, proponoj

8.- Redaktado, laŭtlego kaj eventuala aprobo de la protokolo de la kunsido.

Se vi ne povos ĉeesti, memoru ke vi povas transdoni vian voĉdon-rajton al alia ĉeestonta membro, pere de mesaĝo al: madrid@esperanto.es

Post kelkaj tagoj vi ricevos la diskutotajn dokumentojn kun memorigo de ĉi alvoko.

Subskribas: La prezidanto.

## MEMORIGO PRI (RE)KOTIZO

Ni ripetas nian alvokon de la pasinta monato. Al la membroj de MEL: estas tempo por pagi la jaran membro-kotizon por 2017. Al la ne-membroj de MEL: se vi opinias, ke indas la ekzisto de loka asocio de madridaj esperantistoj, konsideru vian partoprenon en ĝi.

La kotizo por 2017 plu restas senŝanĝa (almenaŭ ĝis la sekva ĝenerala kunveno): 12 eŭroj. La konto de Esperanto-Liceo de Madrid estas IBAN: ES66 3183 2800 1700 0132 8957 en Caja de Arquitectos - Arquia. Metu vian nomon en la spaco "concepto".

## VIZITIS NIN

La 20an de januaro vizitis nin Jolanta, meze de sia veturo el Pollando al Kostariko. Ŝi vizitis nian klubejon, rakontadis pri sia esperantista aktivado kaj lasis plurajn donacojn por la madridaj kolegoj.

## KUNVENOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30.

Finfine, la renkontiĝo semajnfina en januaro okazis dimanĉe la 15-an je la 5-a vespere, en la VIPs de Placo de la Kuboj, kun ĉeesto de deko da homoj. Oni diskutis interalie la eblecon organizi internacian renkontiĝon en Madrido en 2018, ĉu la Internacian Junularan Kongreson, ĉu la Kongreson de ILEI aŭ alian. Pri tio, vidu la ĝeneralan kunvenon de MEL, ĵus kunvokitan.

Pro la koincido de pluraj eksteraj kunvokoj en la komenco de la monato, oni ne antaŭvidas unuasabatan renkontiĝon en februaro, sed atentu la sociajn retojn kaj forumojn, ĉar probable okazos aliaj kunvenoj fine de la monato.

## KONTAKTOJ KAJ INFORMOJ

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com